Kion kredas la kristano?

Kion kredas la kristano?

(el kaj laŭ la katekismo de Heidelberg)

Aranĝis, tradukis kaj komentis
Vinko Ošlak

Kun la permeso de la eldonejo
„Verlag des Evangelischen Brüdervereins“
Wydibühl, CH-3526 Herbligen BE
eldonis
Christliche Büchertstub’n
Klagenfurt / Celovec / Klaŭdiforumo
2007

Origina titolo: „Von unserem Glauben“ – Eine kurze christliche Unterweisung in Frage und Antwort nach dem Heidelberger Kathechismus. – Verlag des Evangelischen Brüdervereins Wydibühl, CH-3526 Herblingen BE, Schweiz, 4. überarbeitete Auflage 1994.

© Evangelischer Brüderverein

Klarigo pri la katekismo el Heidelberg:

En la jaro 1563 estis laŭ la postulo kaj en kunlaboro de la elektoduko de la falco Frederiko III-a de du instruitoj pri Dia vorto Zaĥario Ursinus kaj Kasparo Olevianus pretigita la katekismo de Heidelberg. Tio ĉi prezentas en multaj lingvoj aperintan konfesdokumenton de nia evangelia kredo.

Pri la bibliaj tekstlokoj

Ĉiuj tekstlokoj sub la kategorio „Biblia fundamento“ estas indikitaj nur per lokosignoj por propra serĉado, kio havas duoblan sencon: 1. lerni en la serĉado en la Biblio kaj 2. ŝpari la kostojn de presado. Kiam la teksteroj estas cititaj, ili estas prenitaj el la Esperanta Biblio en la traduko de Zamenhof (MT) kaj de la brita biblia komisio (NT).

Pri la simbolo sur la kovrilpaĝo

La ankro prezentas tradician kristanan simbolon kaj signifas „Certa paco en Kristo“. Rigardu Al Hebreoj 6, 19. Pri A kaj Ω, la unua kaj la lasta litero en la greka alfabeto, konsultu la teksteron el Apokalipso 1, 8.

Kiel trovi la teksteron en la Biblio?

La tutan Biblion konsistigas 66 libroj, kiujn laŭ la inspiro de Dio en la tempokadro de 1000 jaroj skribis ĉirkaŭ 40 skribistoj, kiujn oni subkondiĉe nomas ankaŭ „verkistoj“, kvankam la vera aŭtoro estas Dio mem. La unuan parton konsistigas 39 libroj de la Malnova testamento (MT) kaj la duan 27 libroj de la Nova testamento (NT).
Por stimuli la leganton akiri lertecon de serĉado en la Biblio, tiu ĉi esperantlingva eldono ne citas la menciitajn teksterojn, sed nur indikas ilian lokon. La maniero lokindiki en la Biblio estas tre simpla. Unue oni mencias la unuopan libron, ĉu per plena nomo aŭ mallongigo, kiel ĉi tie. Poste venas la ĉapitro kaj fine la versiklo. Tiel ekz. La indiko 5Mos 2, 12 signifas, ke temas pri la 5-a libro de Moseo, 2-a ĉapitro kaj versiklo numero 12. Unuopaj teksteraj indikoj estas distingitaj per semikolono.

La rekomendo de la eldonisto kaj tradukisto

Nepre legu la Katekismon kun la Biblio ĉemane! Neniu homa klarigo povas anstataŭi la Dian vorton mem! La principo de ĉi tiu verko estas: „Homo demandas – Dio respondas!“ Tio povas funkcii nur, se la leganto konsekvence legos paralele ankaŭ la indikitajn bibliajn teksterojn!

La signifo de la bibliindikaj mallongigoj

Por la Malnova testamento (MT)

1Mos	1-a libro de Moseo	2Mos	2-a libro de Moseo
3Mos	3-a libro de Moseo	4Mos	4-a libro de Moseo
5Mos	5-a libro de Moseo	Psl 1	Psalmo numero 1
Pre	Predikanto	Dan	Libro de Danielo
Hes	Libro de Hesekielo	Esr	Libro de Esra
Neh	Libro de Nehemja	Ijob	Libro de Ijob
Joel	Libro de Joel	Zeh	Libro de Zeharja
Jes	Libro de Jesaja	Sen	Libro (Salom.) de Sentencoj

Por la Nova testamento (NT)

Mat	Evangelio laŭ Mateo	Mrk	Evangelio laŭ Marko
Luk	Evangelio laŭ Luko	Joh	Evangelio laŭ Johano
Agoj	La Agoj de la apostoloj	Rom	letero de Paŭlo al Romanoj
1Kor	la 1-a letero de P. al Korintanoj	2Kor	la 2-a letero de P. al Kor.
Gal	letero de Paŭlo al Galatoj	Efs	letero de Paŭlo al Efesanoj
Fil	letero de P. al Filipianoj	Kol	letero de P. al Koloseanoj
1Tes	1-a letero de P. al Tesalonikanoj	2Tes	2-a letero de P. al Tesal.
1Tim	1-a letero de P. al Timoteo	2Tim	2-a letero de P. al Tim.
Tit	letero de P. al Tito	Flm	letero de P. al Filemono
Heb	letero al Hebreoj	Jak	letero de Jakobo
1Pet	1-a letero de Petro	2Pet	2-a letero de Petro
1Joh	1-a letero de Johano	2Joh	2-a letero de Johano
3Joh	3-a letero de Johano	Jud	letero de Judaso
Apk	Apokalipso		

In halts übersicht

1	–	2	enkonduko
3	–	12	pri la sankta vorto de dio
13	–	22	la mizero de la homoj
23	–	30	la savo de la homo
31	–	33	pento kaj fido
34		36	kredokonfeso
37		39	dio – la patro
40		61	dio – la filo **------ und der hl. geist???**
62		63	la komunumo de la kristfidantoj
		64	la pardono de pekoj
65		67	la resurekto kaj la eterna vivo
68		73	la fidjusteco
74		92	la sanktaj dek ordonoj de dio
93		97	la preĝo
98		110	la patro nia
111		122	sanktaj signoj
123		125	la servo de la ŝlosiloj
126		131	la konkluda vorto

Enkonduko

1 Kio estu via plej grava zorgo?

La savo de mia animo.

Biblia fundamento: Mat 16, 26; Psl 39, 5; Fil 3, 13.14

2 En kio troviĝas la savo de via animo?

Ke mi helpe de Jesuo Kristo akiru la pardonon de miaj pekoj kaj ke mi naskiĝu nove por havi komunecon kun Dio en la tempo kaj en eterno.

Pri la sankta vorto de Dio

3 Kie vi trovas la ĝustan orientigon, kiamaniere atingi la komunecon kun Dio helpe de Jesuo Kristo?

En la Biblio, en la vorto de Dio.

Biblia fundamento: 2Tim 3, 15

4 Kiu verkis la Biblion?

Sub la inspiro de Dia Spirito ĉirkaŭ 40 skribistoj de ĉiuj sociaj tavoloj, profesioj kaj instruitecoj en la tempoarko de 1600 jaroj verkis ĉiujn 66 librojn de la Malnova kaj Nova testamentoj.

Biblia fundamento: 2Pet 1, 21; 2Mos 17, 14; Apk 1, 11.19

5 Kion do vi devas rigardi en la Biblio?

La Biblio estas la sankta revelaciita, senerara Vorto de Dio, kiu estas por mi la sola kaj absoluta gvidŝnuro de mia kredo kaj vivo.

Biblia fundamento: 1Tes 2, 13; 2Tim 3, 16.17

6 Kiu nin instruas ĝuste kompreni la Biblion?

La Sankta Spirito, kiu ankaŭ inspiris la bibliajn skribistojn.

Biblia fundamento: Joh 16, 13; 1Kor 2, 14

7 El kiuj komponaĵoj konsistas la Biblio?

El du esencaj partoj: la Malnova kaj la Nova testamentoj, kiuj kune konsistas el 66 libroj: 39 el la Malnova kaj 27 el la Nova testamentoj.

8 Kion signifas la vorto „Testamento“?

Tio estas la ligo inter Dio kaj homo(j).

Biblia fundamento: 2Mos 24, 8; Mat 26, 28; Jer 31, 33

9 Pri kiu atestas ambaŭ testamentoj?

Ili atestas ambaŭ pri Jesuo Kristo.

Biblia fundamento: Joh 5, 39.46; Agoj 10, 43

10 Kiamaniere rilatas ambaŭ testamentoj inter si?

La Malnova testamento estas la preparo por la Nova – kaj la Nova estas la plenumo de la Malnova.

Biblia fundamento: Luk 24, 44; Mat 5, 17.18

11 En kiuj lingvoj la sanktaj Skriboj estis origine skribitaj?

Preskaŭ la tuta Malnova testamento en la hebrea, etaj partoj en la aramea lingvo. La Nova testamento estis skribita en la komuna greka lingvo *koiné* de la postaleksandra epoko, parolita tiam en la tuta Mediteraneo. Ĝis niaj tagoj la Biblio estas tradukita en pli ol 2000 lingvoj. La Malnova testamento estis tradukita en Esperanton de L.L. Zamenhof mem en la jaro 1917; la Nova testamento estis komisie tradukita en Esperanton en Anglujo en 1924. Ĝis nun aperis multaj eldonoj kaj La Biblio estas daŭre la plej bone vendata libro en Esperanto. Novan tradukon iom post iom preparas kaj eldonas Gerrit Berveling el Nederlando, bona konanto de ĉiuj originaj lingvoj de la Biblio.

12 Ĉu la Biblio estis al ni perita en nefalsifita stato?

Jes, Dio mem tenis super ĝi sian gardomanon. Multaj trovitaj manskribaĵoj kaj iliaj komparoj pruvas ke oni la Biblion persekutis kaj provis detrui aŭ prikaŝi, sed oni ne aŭdacis ĝin falsifi. Neniu antikva literatura dokumento havas tioman pruvmaterialon por validi originfidela kiel la Biblio.

Biblia fundamento: Jer 1, 12

13 Kion oni devas scii por vivi sankte kaj por povi morti en sankteco?

Unue: Mi estas laŭ mia naturo, estiĝinta pro la unua peko de miaj pragepatroj Adam kaj Eva perdita pekanto kaj tiel vivanta en plena mizero. Mi ne povas min savi el propraj klopodoj, eĉ ne per miaj „bonaj agoj“ aŭ „pozitiva pensmaniero“, kiel predikas la voĉo de l' mondo en niaj tagoj. Mia portempa destino estas vivi sen Dio – kaj poreterna destino troviĝi por ĉiam en absoluta foreco de Dio en la fajra lago de perditeco.
Due: Jesuo Kristo savis min per sia verŝita sango el tiu ĉi mizera stato. Li deaĉetis min per sia morto sur la kruco kaj per sia ofero malfermis al mi la eblecon akiri pardonan gracon de Dio kaj eternan vivon en la komuneco kun Li.

14 Kiamaniere oni ekkonas siajn pekojn kaj pekemon?

Surfone de la Dia leĝo, plej klare kaj koncize esprimita en la ĉefa leĝo de Dio, esprimita ĉe Moseo kaj ripetita ĉe Mateo; en Dekalogo, listo de 10 Diaj Ordonoj.

Biblia fundamento: 2Mos 20; Rom 3, 20; Rom 7, 7; Rom 2, 14.15

15 Kion postulas la Dia leĝo de ni homoj?

Ke ni el nia tuta koro, animo kaj racio amu Dion kaj nian ĉiaman proksimulon.

Biblia fundamento: 5Mos 6, 4.5; Mat 22, 37-40; Rom 13, 10

16 Ĉu oni povas plenumi tion ĉi perfekte kaj plene?

Ne, el mia koruptita naturo mi inklinas al malamo rilate Dion kaj mian proksimulon.

Biblia fundamento: 1Mos 8, 21; Tit 3, 3; Rom 7, 23

17 Ĉu Dio kreis la homojn tiom malicaj kaj malbonaj?

Ne, Dio kreis la homon bona kaj laŭ sia imago kaj simileco, justa kaj sankta. Li estis taskigita pli kaj pli koni Dion, sian Kreinton, el tuta koro Lin ami kaj vivi kun Li en eterna beateco por Lin laŭdi kaj adori.

Biblia fundamento: 1Mos 1, 27; 1Mos 1, 31; Pre 7, 29

18 Kio faris la homon tiom korupta?

Pere de la falo kaj malobeo de niaj unuaj gepatroj, Adam kaj Eva en paradizo nia naturo iĝis tiel venenigita, ke ni ĉiuj estis koncipitaj kaj naskitaj en peko.

Biblia fundamento: Rom 5, 12; Psl 51, 7

19 Ĉu ni estas tiom koruptitaj, ke ni estas tute nekapablaj por la bono kaj ke ni inklinas al ĉio malbona?

Jes, el nia propra naturo kaj ĝia karaktero ni neniam povas ekkoni Dion kaj atingi ĉe Li pardonon de niaj pekoj kaj tiel la eternan vivon en Lia Regno.

Biblia fundamento: Rom 3, 10-12; Jes 1, 4-6

20 Ĉu Dio ne estas maljusta kontraŭ la homoj, postulante de ili la plenumon de la leĝo, kiun la homoj ne povas plenumi?

Ne, Dio kreis la homon tia, ke li tion povus plenumi, sed la homo per sia malobeo perdis la donacojn de Dio kaj tiel venigis sin kaj sian idaron en la nunan staton de perditeco.

Biblia fundamento: 1Mos 3, 6-7; Dan 9, 7; Joh 8, 44

21 Ĉu Dio volas ke tiu nia malobeo kaj defalo restu nepunita?

Ne, lia kolero kontraŭ la ribelinta kaj defalinta homo estas terura. Tiu, kiu mortos en Lia kolero, estos ĵetita poreterne en la fajrolagon kune kun demonoj kaj Satano mem.

Biblia fundamento: 5Mos 27, 26; Rom 1, 18; 2, 5; Gal 6, 7;
Psl 7, 12

22 Ĉu Dio ne estas mizerikorda?

Dio estas mizerikorda, sed Li estas ankaŭ absolute justa. Kaj Lia justeco postulas, ke la peko, farita kontraŭ la plejalta Majesto de Dio, estu ankaŭ punita per la plej alta severo, nome per la poreterna puno je la korpo kaj animo de la pekanta homo.

Biblia fundamento: Heb 9, 27; 2Mos 20, 5.6; Rom 6, 23;
Apk 20, 15

La savo de la homo

La nepreco de la alveno de Dia Savanto Jesuo Kristo

23 Post la justa kondamno de Dio oni meritas la portempajn kaj poreternajn punojn. Kiamaniere oni povas eviti tiujn punojn kaj reakiri la gracon ĉe Dio?

Dio insistas je siaj justaj postuloj; tial ni devas por nia kulpo senreste pagi ĉu mem aŭ pere de iu alia.

Biblia fundamento: Hes 18, 4; Mat 5, 26

24 Ĉu la homo povas sian ŝuldon pagi mem?

Ne, kontraŭe, ni faras nian ŝuldon nur plu ĉiutage pli grandan.

Biblia fundamento: Mat 16, 26; Esr 9, 6.7

25 Ĉu iu ajn alia kreitaĵo povus pagi por ni?

Ne, Dio ne volas puni nian kulpon sur iu ajn alia kreitaĵo. Estus ankaŭ al iu nura kreitaĵo neeble transpreni la eternan koleron de Dio pro la faritaj pekoj kaj liberigi de tio la homojn.

Biblia fundamento: Psl 49, 8.9; Heb 10, 11

26 Kia devus esti nia peranto kaj savanto?

Tiu devus esti vera kaj absolute justa homo kaj tamen pli forta ol iu ajn alia kreitaĵo, do paralele ankaŭ vera Dio.

Biblia fundamento: 1Kor 15, 21; Heb 7, 26; Heb 2, 17.18

27 Kial tiu peranto kaj savanto devas esti vera kaj absolute justa homo?

Ĉar la justeco de Dio postulas, ke la homa naturo, kiu pekis, pagu por la pekoj. Tiu, kiu mem havus pekojn, do ne povus pagi por la aliaj.

Biblia fundamento: Hes 18, 4; Rom 5, 15; 1Pet 3, 18

28 Kial tiu peranto kaj savanto samtempe devas esti vera Dio?

Por ke Li povu, havante la forton de sia dieco, transpreni kaj porti la ŝarĝon de la Dia kolero sur la ŝultroj de sia homa naturo por tiel akiri por ni la justecon kaj la eternan vivon.

Biblia fundamento: Nah 1, 6; 1Tes 1, 10; Heb 9, 12

29 Jesuo Kristo estas tiu Peranto kaj Savanto – sed de kie oni tion scias?

El la sankta evangelio. Dio revelaciis tion mem jam en la paradizo, poste li anoncigis tion helpe de patriarkoj kaj profetoj. La oferoj kaj aliaj ceremonioj de la malnova testamento estis la antaŭbildo de nia Savanto – kaj fine plenumita en la Filo de Dio.

Biblia fundamento: 1Mos 3, 15; Agoj 10, 43; 1Tim 2, 5.6;
1Joh 5, 20

30 Ĉu ĉiuj homoj pere de Kristo fariĝos beataj, samkiel ili pere de Adamo fariĝis perditaj?

Ne. Nur tiu, kiu fariĝos inokulita ĉe la trunko de Kristo, per sincera pento kaj vera fido transprenante ĉiujn bonfarojn de Dio.

Biblia fundamento: Mat 7, 13.14; Agoj 3, 19; Joh 3, 18.36

Pento kaj fido

31 Kio estas la sincera pento?

El sia tuta koro bedaŭri siajn pekojn, ilin konfesi al Dio, voli ordigi sian pasintecon kaj malami de tiu momento ĉiun pekon. Agnoski la veron, kia troviĝas en la vorto de Dio kaj plene subigi sian vivon al ĝi.

Biblia fundamento: Psl 51, 5.6; 1Joh 1, 8.9; Joel 2, 13; Sent 28, 13; Luk 3, 8; Hes 33, 14.15; Luk 19, 8; 1Tes 1, 9; Jes 44, 22; Joh 8, 31.32; Mat 7, 20

32 Kio estas la ĝusta fido?

La ĝusta fido estas certa rekono, ke ĉio, kion Dio al mi revelaciis per sia vorto, estas vera. Tio estas ankaŭ elkora konfido, kian Sankta Spirito vekas en mi helpe de la evangelio, ke al mi kaj ne nur al la aliaj estas de Dio donacita la pardono de la pekoj, eterna justeco kaj beateco – el nura graco pro la merito de Jesuo Kristo.

Biblia fundamento: Heb 11, 1; Efe 3, 12; Rom 5, 1; Joh 6, 29; Heb 11

33 Kion devas kredi la kristano?

Ĉion, kio estas promesita en la vorto de Dio kaj en la ĝenerala evangelia kredokonfeso.

Biblia fundamento: Agoj 24, 14; Mat 28, 20

KREDOKONFESO

34 Kiel tekstas la kredokonfeso?

Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova,
la kreinto de la ĉielo kaj de la tero;
kaj je Jesuo Kristo,
Lia unu-nura Filo, nia Sinjoro,
koncipita per la Sankta Spirito,
naskita el Maria la Virgulino,
suferinta sub Poncio Pilato,
krucumita, mortinta kaj entombigita,
sobirinta en la regnon de la morto.
La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj,
supren-iris al la ĉielo,
sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,
de kie Li venos, por juĝi la vivantojn kaj
la mortintojn.
Mi kredas je la Sankta Spirito,
pere de kiu ni ĉiuj estis baptitaj
al unu korpo, kies kapo estas Kristo,
la komuno de la sanktuloj,
la pardono de la pekoj,
la releviĝo de la mortintoj,
kaj la vivo eterna.
Amen.

35 Kiamaniere tiu ĉi kredokonfeso estas dividita?

Je tri partoj. La unua pritraktas Dion la Patron kaj nian kreitecon fare de Li; la dua pritraktas Dion la Filon kaj nian savitecon; la tria pritraktas Dion la Sanktan Spiriton kaj nian sanktigon.

36 Se tamen ekzistas unu sola Dio, kial oni mencias tri personojn: la Patron, la Filon kaj la Sanktan Spiriton?

Ĉar Dio en sia vorto sin tiel al ni revelaciis; tiuj ĉi tri diversaj Dipersonoj estas unu nura kaj vera kaj eterna Dio.

Biblia fundamento: Jes 45, 22; Mat 28, 19; 2Kor 13, 13

Dio – la Patro

37 Kion oni fakte kredas, kiam oni diras: Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova, la kreinto de la ĉielo kaj de la tero?

Mi kredas, ke Li estas la eterna Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Li kreis la ĉielon, la teron kaj ĉion sur la tero per sia vorto el nenio. Li ekzistigas kaj regas sian kreitaron daŭre per sia eterna konsilo kaj providenco. Mi kredas, ke Li pro sia Filo Jesuo Kristo estas mia Dio kaj mia Patro. Mi fidas je Li kaj ne dubas, ke Li prizorgos min per ĉio, kion mi bezonas por mia korpo kaj por mia animo. Kiel la ĉiopova Dio kaj fidela Patro Li povas kaj volas ĉion, kion Li al mi en tiu ĉi vivo allasas, stiri por mia pleja bono.

Biblia fundamento: Efs 3, 14-16; Heb 3, 4; Heb 11, 3; Rom 8, 28; Jes 46, 4; Psl 115, 3

38 Kion vi komprenas sub la nocio „la providenco de Dio“?

La ĉiopovan kaj ĉieĉeestan forton de Dio, per kiu Li la ĉielon kaj la teron kun ĉiuj kreitaĵoj samtempe kvazaŭ per sia mano ekzistigas kaj regas. Folioj kaj herboj, pluvo kaj senpluva periodo, fekundaj kaj malfekundaj jaroj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, sano kaj malsano, riĉeco kaj malriĉeco, ĉio-ĉi ne venas al ni pere de hazardo, sed el Lia patra mano. Eĉ se Li per sia providenco kontrolas ankaŭ la maljustaĵojn, Li tamen neniam estas la kaŭzo de la peko. Kiel oni sur la ekzemplo de Jozefo kaj liaj fratoj, aŭ ĉe David kaj Simei, ĉe Kristo kaj Judoj vidas, povas Dio la maljustaĵojn stiri al iu bona celo.

Biblia fundamento: Psl 139, 7-10; Rom 11, 36; Sent 16, 9-33; Ijob 5, 18.19; Rom 11, 33; 1Mos 50, 20

39 Kia utilo, se oni rekonas la veron pri la kreado kaj providenco de Dio?

Ke ni por ĉio dankeme povas insisti paciencaj en ĉiuj atakoj kaj en bona espero por la estonto flanke de nia fidela Dio kaj Patro. Neniu kreitaĵo povas nin depreni de Lia amo, ja ĉio troviĝas en Lia mano.

Biblia fundamento: Psl 118, 1.4; Psl 116, 12; Ijob 1, 21; 1Pet 5, 7; Psl 37, 5

Dio – la Filo

40 Kial la Filo de Dio nomiĝas *Jesuo*?

Li nomiĝas Jesuo (= Dio savas kaj sanktigas), ĉas Li nin savas de niaj pekoj kaj ĉar oni ĉe neniu alia povas serĉi kaj trovi la beatecon.

Biblia fundamento: Mat 1, 21; Agoj 4, 12; 1Kor 3, 11

41 Kial oni alparolas Jesuon *Kristo*?

La greka vorto „christós“ signifas „la oleumito, balsamito“, ĉar li estis instalita de sia Patro Dio kaj li estas balsamita de la Sankta Spirito. En la Malnova testamento la reĝoj de Israel estis oleumitaj – kaj Jesuo estas instalita Reĝo de la reĝoj. Li estas balsamita ankaŭ kiel nia plej alta Profeto kaj Instruisto. Li revelacias al ni la ĉielan ordon kaj la volon de Dio rilate nian savon. Li estas balsamita ankaŭ kiel nia ĉefsacerdoto, kiu nin savis pere de sia unufoja ofero de sia vivo kaj reprezentas nin antaŭ sia Patro daŭre kun sia porpeto por ni.

Biblia fundamento: Agoj 2, 36; Heb 1, 9; 5Mos 18, 18; Jes 61, 1; Heb 1, 2; Heb 10, 14; Heb 8, 1.2; 1Joh 2, 1; Rom 8, 34; Zah 9, 9; Joh 18, 36.37; Mat 28, 18; 2Tes 3, 3

42 Kial mi nomiĝas *kristano*?

Ĉar mi pere de la fido fariĝis membro de Kristo mem kaj tiel partoprenas en Lia balsamiteco. Mi devas agnoski Lian nomon kaj min disponigi al Li kiel vivanta dankprimico kaj en tiu ĉi vivo el libera konscienco kontraŭstari la pekon kaj Satanon kaj per mia vivmaniero honori Kriston.

Biblia fundamento: Agoj 11, 26; 1Joh 2, 27; 1Pet 2, 9; Fil 1, 27; Rom 12, 1

43 Kial Jesuo nomiĝas ankaŭ *„la ununaskita Filo de Dio“*, se ankaŭ ni estas la gefiloj de Dio?

Ĉar Kristo nura estas la eterna Filo de Dio. Ni tamen, kiel Liaj posteuloj pere de la fido naskiĝas denove kiel la gefiloj de Dio, pri Kristo, nur el la graco.

Biblia fundamento: Joh 1, 18; Efe 1, 5; Gal 3, 26; 1Joh 3, 1; Jes 53, 10; Jak 1, 18

44 Kial oni nomas Jesuon *„nia Sinjoro“*?

Ĉar Li savis kaj deaĉetis nin, nian korpon kaj nian animon, de la pekoj kaj de la tuta povo de Satano per sia valorega sango. Nun ni estas Lia posedaĵo.

Biblia fundamento: Apk 5, 9; 1Pet 1, 18.19; Joh 13, 13; Psl 16, 2; 1Kor 7, 23; 2Kor 5, 15

45 Kion signifas la vortoj: *„koncipita per la Sankta Spirito, naskita el Maria la Virgulino“*?

Ke la eterna Filo de Dio, kiu mem estas la vera Dio kaj restas poreterne, el la karno kaj sango de Virgulino Maria alprenis la veran homan naturon pere de la Sankta Spirito kaj Lia efikado. Tiel Jesuo vere fariĝis la ido de David kaj tiel al siaj homaj fratoj egala en ĉio krom en peko.

Biblia fundamento: Luk 1, 35; Heb 2, 14; Rom 9, 5; 2Sam 7, 12

46 Kion signifas la vorto: *„suferinta“*?

Ke li dum la tuta tempo de sia restado sur la tero suferis je sia korpo kaj animo. Aparte je la fino de sia surtera vivo Li portis la koleron de

Dio pro la pekoj de la tuta homaro, por ke Li per sia sufero niajn korpojn kaj animojn savu el la poreterna malbeno. Ne ekzistas iu alia repaciĝa ofero por ni.

Biblia fundamento: Fil 2, 6-8; Mat 8, 20; Jes 53, 3-7; Heb 5, 7-8; Mat 26-27; Mar 14-15; Luk 22-23; Joh 18-19

47 Kial estas skribite *„sub Poncio Pilato“*?

Ĉar li estis kondamnita senkulpa sub la mondregna juĝisto Poncio Pilato, la prokuratoro de la roma imperiestro Tiberio, kaj nin tiel liberigis de la severa kondamno de Dio, kio cetere estus nia destino.

Biblia fundamento: Joh 19, 6; Joh 19, 16; 1Pet 3, 18

48 Ĉu la surkruca morto signifas pli ol nur unu el la mortigmanieroj?

Jes. Tiamaniere mi povas vivi en certeco, ke la damno, kiu kuŝis sur mi, estis de Jesuo forprenita, ja la morto sur la kruco estis sub la damno de Dio.

Biblia fundamento: 5Mos 21, 22.23; Gal 3, 13

49 Kial Kristo estis surkruce forlasita de Dio?

Ĉar Jesuo por ni fariĝis mem la peko; kaj la peko baras antaŭ Dio. Tiel Jesuo anstataŭe por ni travivis la forlasitecon de Dio. Nun ni povas havi certecon eĉ dum la plej fortaj tentoprovokoj, ke Li savis nin per sia neeldirebla angoro, doloroj kaj terureco de la infera timo kaj sufero.

Biblia fundamento: Mat 23, 46; Jes 53, 8; 2Kor 5, 21

50 Kial Kristo devis morti?

Pro la justeco kaj vero de Dio niaj pekoj ne povis esti alimaniere rekompencitaj krom pere de la morto de la Filo de Dio.

Biblia fundamento: Joh 3, 16; Rom 6, 23; Mrk 10, 45; Joh 19, 30; 2Kor 5, 15

51 Kian utilon ni havas pro la ofera morto de Kristo surkruce?

Helpe de Lia forto nia malnova homo estis kun Li krucumita kaj mortigita. Ni formortis al la peko. La malicaj pasioj ne povas plu regi super ni.

Biblia fundamento: Rom 6, 10-12; 1Pet 2, 24; 2Kor 5, 14; Gal 6, 14

52 Kial oni mencias, ke Li estis *entombigita*?

Por atesti, ke li vere mortis sur la kruco. La malnova homo de ni kun Kristo ne nur mortis, sed kun Li ankaŭ estis entombigita kaj forigita.

Biblia fundamento: Joh 19, 40-42; Rom 6, 4; Rom 6, 6.6

53 Kion signifas la vortoj: *„sobirinta en la regnon de la morto“*?

Ke Kristo, post kiam li mortis, atestis pri la evangelio en la regno de la mortintoj.

Biblia fundamento: 1Pet 3, 18-20; 1Pet 4, 5-6

54 Kion signifas la vortoj: *„La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj“*?

Ke Li la trian tagon post sia morto pere de la povo de Dio kun sia korpo releviĝis; dum la 40 tagoj li vidigis sin al siaj disĉiploj kaj parolis kun ili pri la Regno de Dio.

Biblia fundamento: Mat 28, 2-4; Agoj 2, 24; Agoj 1, 3

55 Kian utilon ni havas de la releviĝo de Kristo?

**Kristo supervenkis per sia releviĝo la morton. Nun Li povas donaci al ni la justecon, kiun Li akiris per sia morto.
Helpe de Lia povo ankaŭ ni estos vekitaj por nova vivo.
La releviĝo de Kristo estas por ni sekura garantiaĵo de nia propra kunkorpa releviĝo.**

Biblia fundamento: 2Tim 1, 10; Heb 2, 14.15; Rom 4, 25; Rom 5, 1; 2Kor 5, 21; Efe 2, 5-6; Rom 6, 4-5; 2Kor 5, 17; Rom 8, 11; Rom 8, 23; 1Kor 15, 49

56 Kion signifas la vortoj *„Li supren-iris al la ĉielo, sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova“*?

Kristo estis antaŭ la okuloj de siaj disĉiploj levita en la ĉielon. Kiel la kapo kaj Sinjoro de sia komunumo Li estas nia reprezentanto dekstraflanke de sia Patro, kiu pere de Li ĉion regas.

Biblia fundamento: Agoj 1, 9-11; Fil 2, 9-11; Heb 9, 24

57 Ĉu Kristo ne troviĝas inter ni ĝis la fino de la mondo, kiel Li promesis?

Kristo estas vera homo kaj vera Dio samtempe. Kiel la homo Li ne troviĝas plu surtere, tamen laŭ sia Dieco, sia Majesto, sia graco kaj laŭ sia Spirito Li neniam plu retiriĝas de ni.

Biblia fundamento: Joh 16, 28; Agoj 17, 27.28; Joh 14, 23; Heb 13, 5

58 Kial ni havas en nia tempo en la ĉieca ĉeesto de Kristo pli grandan utilon ol en Lia homa humiliĝo?

Kristo nun ne estas plu subigita al korpaj kaj spacaj limigoj, pere de sia Spirito Li estas ĉiam inter ni.

Biblia fundamento: Joh 11, 21; Mat 28, 20; Mat 18, 20

59 Kian utilon ni havas pro la ĉieleniro kaj majesteco de Kristo?

Jesuo Kristo estas nia porparolisto en la ĉielo antaŭ sia Patro. Jesuo Kristo nin protektas kaj ekzistotenas pere de sia povego kontraŭ ĉiuj malamikoj.
Jesuo Kristo garantias al ni, ke Li kiel la Kapo nin, siajn membrojn, prenos al si.
Jesuo Kristo sendas sian Sanktan Spiriton, per kies povo ni traserĉas, kio troviĝas supre kaj kio ne, kio troviĝas sur la tero. Jesuo Kristo verŝas pere de sie Sankta Spirito siajn spiritajn donacojn super ni.

Biblia fundamento: Rom 8, 34; 1Joh 2, 1; Joh 10, 27-30; Rom 8, 38.39; 2Tes 3, 3; Efe 1, 22.23; Joh 14, 3; Joh 17, 24; Joh 16, 7; Agoj 1, 8; Kol 3, 1.2; Efe 4, 10-12; 1Kor 12, 7-11

60 Kian konsolon donas al vi la „reveno de Kristo por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn“?

Ke mi spite al ĉiuj plagoj kaj persekutoj per la rektiĝanta kapo atendas je mia Sinjoro el la ĉielo, kiu antaŭ tio konfrontis sin por mi kun la Dia juĝo kaj forprenis de mi la malbenon. Li prenos min kaj ĉiujn elektitojn al si en la ĉielan ĝojon kaj apoteozon.
Jesuo Kristo revenos unuafoje por forpreni sian eklezion. Due Kristo venos por juĝi pri la faroj de la fidantoj. Trie Li faros la finan juĝon.

Biblia fundamento: Luk 21, 28; Fil 3, 20; Agoj, 1, 11; 1Tes 4, 16.17; 1Kor 15, 51.52; 1Joh 3, 2.3; Mat 24, 42; 2Kor 5, 10; Mat 25, 40; 1Kor 3, 12-15; 1Kor 4, 5; Apk 22, 12; Joh 5, 22-27; Apk 20, 11-15

61 Kion vi kredas pri la Sankta Spirito?

Ke la Sankta Spirito kune kun la Patro kaj la Filo estas unu eterna Dio. La Sankta Spirito estas donita ankaŭ al mi. Li malkovras al mi pere de vera fido Kriston kaj ĉiujn liajn bonfarojn kaj partoprenigas min en ili. Li konsolas, gvidas kaj avertas min kaj volas resti ĉe mi ĝis la eterno.

Biblia fundamento: 1Mos 1, 2; 2Kor 13, 13; Heb 9, 14; Efs 1, 13; 1Kor 6, 19; Rom 8, 9; Joh 16, 13-14; Joh 14, 16; 1Tes 5, 19

La komunumo de la Kristfidantoj

62 Kion vi kredas pri la sankta, ĉiujn popolojn kaj lingvojn ampleksanta kristfida komunumo?

Ke la Filo de Dio el la tuta homaro de ĉiuj epokoj deaĉetis por si la komunumon por la eterna vivo.
Pere de la Dia vorto kaj la Sankta Spirito la komunumo estas kompilata, protektata kaj en la unueco de vera fido konservata.
Jesuo Kristo estas la kapo de tiu ĉi komunumo.
Mi samtiel kredas, ke ankaŭ mi kiel la vivanta membro nun kaj en la eterno apartenas al tiu ĉi komunumo.

Biblia fundamento: Apk 5, 9; Efs 5, 25-27; Efs 3, 16; 1Pet 5, 10; 1Kor 1, 8; Efs 1, 22.23; Rom 8, 38.39

63 Kion signifas la komunumo de la sanktaj?

Ĉiuj veraj fidantoj havas komunecon kun Kristo kaj rajton je ĉiuj liaj trezoraĵoj kaj donacoj.
Ni devas nin preni dum nia agado al aliaj membroj por kulpaj kaj ni devas la al ni donacitajn donacojn disponigi al nia Sinjoro Jesuo por la utilo kaj sankteco de ĉiuj membroj kun plena volo kaj ĝojo.

Biblia fundamento: 1Joh 15, 1, 3; Luk 15, 31; Kol 2, 9.10; 1Kor 10, 32.33; 1Pet 4, 10; Efs 4, 1-16

La pardono de pekoj

64 Kion vi kredas pri la pardono de pekoj?

Ke Dio pro la plena sinofero de Kristo rememoros plu pri neniu el miaj pekoj, ankaŭ ne pri pekaj tentoj, sub kiuj mi devas batali mian bonan batalon du mia tuta vivo.
Mi ne venos plu sub la juĝon, ja el la graco Li donacis al mi la justecon de Kristo.

Biblia fundamento: Jes 43, 25; Kol, 2, 13; 2Kor 5, 21; 1Pet 2, 11; Joh 5, 24

La resurekto kaj la eterna vivo

65 Kiun konsolon donas al vi la releviĝo de la korpo?

Ne nur mia spirito (la homa persono) estos tuj post la ĉeso de tiu ĉi vivo prenita al Kristo, sed ankaŭ mia korpo dum la depreno el tiu ĉi mondo okaze de la dua alveno de Kristo estos revokita, unuigita kun mia spirito kaj formita en la apoteozo egala al la korpo de Kristo. Ĉio-ĉi okazos pere de la povo de Dio.

Biblia fundamento: Luk 23, 43; Joh 5, 28.29; 1Joh 3, 2; Heb 12, 23

66 Kian konsolon donas al vi la konfirmo pri via eterna vivo?

Per la novnaskiĝo mi ricevas la eternan vivon kaj la komencon de la eterna ĝojo.
Se mi vivas ĉi tie en Kristo, mi atingo post tiu ĉi vivo la perfektan beatecon, por eterne laŭdi kaj adori Dion.

Biblia fundamento: Joh 17, 3; Joh 3, 36; Rom 14, 17; 1Joh 3, 14.15; 1Joh 2, 28; Heb 10, 38.39

67 Kio estas via nura konsolo en via vivo kaj en via morto?

Ke mi kun korpo kaj spirito
en vivo kaj en morto
ne mia posedaĵo, sed posedo
de fidela Savdonanto Kristo estas;

kiu per la multekosta sia sang'
plene miajn pekojn pagis
kaj min el perfort' kompleta
de Satano siagrace savis.

Kaj ĉar li min protektis,
ke sen volo de eterna Patro enĉiele
eĉ la haro ne defalas miakape,
sed ĉio devas servi mian beatecon.

Jen tiel li min garantias helpe
de Spirito Sankta por eterna vivo;
kaj tiu faras niajn korojn molaj kaj kapablaj,
vivi nur por Li kaj Lin adore servi.

Biblia fundamento: Rom 14, 7.8; Efs 1, 7; 1Kor 6, 20¸1Tes 5, 23.24; Rom 8, 28; Gal 2, 20; Fil 1, 21

La fidjusteco

68 Kia helpo, se vi ĉion-ĉi kredas?

Ke mi estas rajtigita antaŭ Dio kaj ke mi estas heredanto de la eterna vivo.

Biblia fundamento: Rom 10, 10; Rom 1, 16.17; 1Joh 3, 7; Tit 3, 7.8

69 Kiamaniere vi estas rajtigita antaŭ Dio?

Nur pro vera fido en Jesuon Kriston!
Eĉ se mia konscienco min akuzus,
ke mi pekis kontraŭ la leĝaro Dia
kaj ke mi neniun leĝon tenis,
kaj se mi daŭre estus alirebla al la tento peka,
do tamen mi certece scias:
Dio sen merito mia, el la nura graco,
pridonacas min per plena rekompenco kaj sankteco Krista,
kiel se neniam mi mem pekus
kaj el propra volo-povo la leĝaron sen postrest' plenumus
kaj ĉiam plenrespekte Dion nur obeus,
ja Jesuo Kristo ĉion-ĉi por mi anstataŭante faris.
Sub nur kondiĉo unu:
ke mi ĉiujn-ĉi bonfarojn Kristajn
per fidanta koro en la dank' alprenas.

Biblia fundamento: Rom 10, 4; Rom 8, 33; Efs 2, 8.9; Kol 1, 12

70 Kial vi diras, esti pravigita nur helpe de via fido?

Ne temas pri tio, ke mi plaĉus al Dio pro la digno de mia fido, sed ĉar nure la kompenso, justeco kaj sankteco de Kristo estas mia justeco antaŭ Dio, kaj mi povas tion alpreni nur pere de la fido.

Biblia fundamento: 1Kor 1, 30; Rom 3, 28

71 Kial tamen niaj bonfaroj ne povas esti nia pravigo antaŭ Dio, eĉ ne nur parto de ĝi?

Ĉar la pravigo, kiu povus esti konfirmita de Dio, devus esti perfekta kaj plene kongrui kun la Dia leĝo. Niaj propraj, tiel nomataj bonaj faroj tamen estas malperfektaj kaj malpurigitaj de la pekoj, se ni ne naskiĝis denove.

Biblia fundamento: Mat 5, 20; Gal 3, 10; Jes 64, 5

72 Kiuj vere estas la bonaj faroj?

Nur tiuj, kiuj estas faritaj post nia denova naskiĝo el vera fido, laŭ la vorto de Dio, je Lia honoro. Por tiuj faroj ni ricevos rekompencon.

Biblia fundamento: 1Kor 10, 31; Rom 14, 23; Mat 10, 42;
Gal 6, 9.10

73 Ĉu tiu ĉi instruo ne faras vin indiferenta?

Ne, Jesuo instruas, ke ĉiuj, kiuj en li restas, donas la fruktojn de justeco, kiun li vekas en ni.
Kristo renovigis nin per sia Spirito kaj li iluminas nin daŭre helpe de sia Spirito. Ni devus adori Dion per nia kompleta vivo. Tiamaniere ni montras nin al Li sincere dankemaj.
„La bonaj faroj faras nenian kristanon, sed vera kristano faras bonajn farojn.“ (D-ro Marteno Luther)

Biblia fundamento: Rom 6, 1.2; Efs 2, 10; Mat 7, 18; Fil 1, 11;
1Tes 5, 23; Joh 15, 1-8

La sanktaj Dek ordonoj de Dio

74 Kion ni komprenas sub la nocio „la Leĝo de Dio“?

La gvidlinioj de nia vivo, kiujn donis al ni Dio en la Malnova kaj en la Nova testamentoj.
En la Biblio estas ofte ankaŭ la kvin libroj de Moseo prezentitaj kiel „la Leĝo“. La kerna parto de ili estas la Dek ordonoj, kiujn Dio mem skribis sur la ŝtontabulojn.

Biblia fundamento: 5Mos 4, 12.13; Mat 5, 17; Heb 8, 10;

75 Kiel tekstas la Dek ordonoj?

La 1-a ORDONO
Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.

La 2-a ORDONO
Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj, kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.

La 3-a ORDONO
Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.

La 4-a ORDONO
Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bruto, nek

via fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj; ĉar dum ses tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion, kio estas en ili, sed en la sepa tago Li ripozis. Tial la Eternulo benis la tagon sabatan kaj sanktigis ĝin.

La 5-a ORDONO
Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.

La 6-a ORDONO
Ne mortigu.

La 7-a ORDONO
Ne adultu.

La 8-a ORDONO
Ne ŝtelu.

La 9-a ORDONO
Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.

La 10-a ORDONO
Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.

(2Mos 20, 2-17)

76 Por kiu celo servas al ni la Dek ordonoj de Dio?

Por ke ni tiamaniere ekkonu nian pekan staton kaj nian kulpon antaŭ Dio kaj ke ni tiel estu kondukitaj al la konvertiĝo kaj al la fido je Jesuo Kristo.
Kiel la denove naskitaj homoj ni rekonas en Dek ordonoj la volon de Dio, kiun Li volas plenumi pere de Jesuo Kristo en nia vivo en la spirito kaj en la amo.

Biblia fundamento: Rom 8, 2-4

Nia konduto antaŭ Dio

La 1-a ORDONO
Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.

77 Kion volas Dio per tiu ĉi Ordono?

Ke mi vere ekkonu la unuelan, veran Dion, la Kreinton de la Ĉielo kaj de la tero kaj la Patron de nia Sinjoro Jesuo Kristo.
Ke mi en plena humilo kaj pacienco al li nura fidu kaj atendu de li ĉian bonon.
Ke mi amu lin per mia tuta koro, lin adoru kaj timu, jen tio estu la senco de mia vivo.
Ke mi prefere lasu preterpasi ĉion alian ol ke mi eĉ en plej eta afero parolu kontraŭ lia volo aŭ eĉ agu.

Biblia fundamento: Apk 4, 11; Efs 1, 3; Psl 103, 2; 34, 10; Jer 17, 5-7

78 Kion Dio en tiu ĉi Ordono malpermesas?

Dio malpermesas kompletan idoladon kaj magion, la tutan superstiĉon kaj alvokon de la kreitaĵoj (ekz. de la tn. sanktuloj aŭ de la mortintoj ktp.). Ĉion-ĉi mi devas decide malakcepti, ja mi cetere perdas mian animsavitecon kaj mian sanktecon.

Biblia fundamento: 5Mos 18, 9-13; 3Mos 19, 26; Jer 2, 27.28; 1Kor 10, 7; Mat 6, 21

La 2-a ORDONO

Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj, kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.

79 Kion Dio malpermesas en tiu ĉi Ordono?

Ke ni ne bildigu Dion, la Patron; ke ni ne honorigu lin je iu ajn alia maniero ol li mem ordonis en sia Vorto.
Rilate ĉiujn aliajn bildigojn li malpermesas ilin adori aŭ lin per ili servu.

Biblia fundamento: 5Mos 4, 15-18; Psl 115, 4-9; Joh 1, 18; Agoj 17, 29; Joh 4, 24

80 Kion Dio volas per tiu ĉi Ordono?

Ke ni estu helpe de viva predikado de Dia vorto por Jesuo Kristo akiritaj kaj en la kredo instruitaj; ne per mutaj idoloj, ankaŭ ne per teatraĵoj, filmoj aŭ religiaj ludoj. La vorto de Dio sola estas la spirito kaj la vivo.

Biblia fundamento: Rom 10, 17; 1Kor 1, 22-24; Heb 4, 12

La 3-a ORDONO

Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.

81 Kion postulas Dio en tiu ĉi Ordono?

Ke ni la nomon de Dio ne elparolu facilanime aŭ neaŭtente; ke ni ne malbenu Dion aŭ lin blasfemu aŭ elparolu lian nomon por ĵuri. Ke ni uzu lian nomon per timrespekto kaj en adoro.

Biblia fundamento: 5Mos 28, 58.59; Mat 12, 31; 2Tim 2, 19; Jak 5, 12; Psm 29, 2

82 Ĉu la malbenado kaj la blasfemado de Dia nomo estas tiom pezaj pekoj, ke ni pere de indiferenta kunaŭskultado mem ŝarĝas nin per kulpo?

Jes. Tiuj ĉi pekoj, nome, estas grandaj kaj kolerigas Dion forte. Tial li ankaŭ en la Malnova Testamento ordonis puni ilin per la morto. Ni ne avertu nur nin mem kaj niajn proksimulojn, kiam la nomo de Dio estas blasfemata, sed ankaŭ, kiam oni parolas maldece aŭ rakontas nemoralajn ŝercojn kaj kondutas frenez-karnevale; kiam oni kritikas aliajn personojn aŭ malbone parolas pri la registaro; kiam oni plendas kaj veumas aŭ en la kristankunvena loko klaĉas mondece.

Biblia fundamento: 3Mos 24, 15.16; Hes 3, 19; Pro 27, 5; 3Mos 19, 17; Mat 18, 15

La 4-a ORDONO

Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bruto, nek via fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj; ĉar dum ses tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion, kio estas en ili, sed en la sepa tago Li ripozis. Tial la Eternulo benis la tagon sabatan kaj sanktigis ĝin.

83 Kion Dio volas per tiu ĉi Ordono?

Tiu ĉi festotago estu por ni kvieta tago por nia korpo kaj por nia animo, en kiu ni laŭdu Dion kaj lin adoru.
Ni uzu tiun ĉi tagon ankaŭ por lerni kaj aŭdi lian Vorton en dimanĉlernejoj kaj kunvenoj. Ni rajtas en la komuneco de la fidantoj alvoki Dion kaj kontribui nian parton en la konstruado de la Dia regno.
Dio ankaŭ volas, ke mi en ĉiuj tagoj de mia vivo, libera de malbonaj agoj, lasu lin agefiki pere de lia Spirito en mi, tiel komencante la eternan sabaton en tiu ĉi vivo.
Per la morto de Jesuo Kristo kaj per lia resurekto la eterna sabato komencis ekzisti por ĉiuj, kiuj naskiĝis (denove) el Dio. Se tiaj homoj volas plaĉi al Dio per la agoj de la Leĝo, ili tiel rompas la eternan sabaton.

Biblia fundamento: Jes 58, 13.14; Mrk 2, 27.28; 1Kor 16, 1.2; 4Mos 15, 32-36; Heb 4, 10.11; Kol 2, 16.17

Nia konduto antaŭ aliaj homoj

La 5-a ORDONO
Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.

84 Kion Dio postulas en tiu ĉi Ordono?

Ke mi prezentu al mia patro kaj patrino kaj al ĉiuj miaj superuloj honoron, amon kaj fidelon kaj ke mi alprenu ĉiujn bonajn instruojn kaj punojn per la obeo, kiun ili meritas.
Dio volas min direkti pere de ilia mano. Ankaŭ en la kazo ke ĉe ili troviĝas mankoj kaj devojiĝoj, mi devas ilin toleri per pacienco.

Biblia fundamento: 2Mos 21, 15-17; Kol 3, 20; Pro 15, 20;
Tit 2, 9.10; Heb 13, 17; 1Pet 5, 5; 1Pet 2, 13; 3Mos 19, 32

La 6-a ORDONO
Ne mortigu.

85 Kion Dio malpermesas en tiu ĉi Ordono?

Ke mi mian proksimulon en nenia okazo insultu, ofendu, malamu aŭ eĉ mortigu, nek nur en pensoj nek en vortoj, gestoj aŭ agoj.
Ke mi ne praktiku revenĝon. Tial ankaŭ la ŝtata povo portas la glavon por malebligi la mortigadon kaj violenton.
Ankaŭ kontraŭ mi mem mi faru neniun damaĝon kaj mi ne prenu min propravole en danĝeron (krom por en la spirito de amo helpi al proksimulo kaj por atesti pri la fido je Jesuo Kristo).

Biblia fundamento: 2Mos 21, 12.13; Mat 5, 21.22; 1Joh 3, 15;
Rom 12, 19; Rom 13, 14; Mat 4, 7

86 Kion postulas Dio en tiu ĉi Ordono?

Dio volas de ni, ke ni niajn proksimulojn amu kiel nin mem. Tial ni estu kun ili paciencaj, pacemaj, mildaj, indulgemaj kaj amikaj, volontaj laŭeble ĉiam malebligi damaĝon ĉe ili. Dio volas, ke ni faru bonon al tiuj, kiuj rilatas al ni malamike.

Biblia fundamento: Mat 7, 12; Jes 58, 7; Rom 12, 20.21; Mat 5, 44

La 7-a ORDONO
Ne adultu.

87 Kion Dio volas per tiu ĉi Ordono?

Ke ni la geedzecon kiel de Dio instalitan vivkomunecon de viro kaj virino ĝis la morto fidele kaj pure vivu kaj respektu.

Biblia fundamento: Mat 19, 4-6; 3Mos 20, 10; Mat 5, 27.28; 31.32; Heb 13, 4

88 Ĉu tiu ĉi Ordono koncernas nur la rilaton en la geedzeco?

Ne. Ĉar en ni loĝas la Spirito de Dio, li volas, ke nia korpo kaj nia animo restu puraj kaj sanktaj. Tial li malpermesas ĉiujn malĉastajn agojn, gestojn, vortojn, pensojn kaj dezirojn kaj ĉion, kio povus la homon inciti al malĉastaĵoj.

Biblia fundamento: 1Kor 6, 18-20; 1Kor 15, 33

La 8-a ORDONO
Ne ŝtelu.

89 Kion Dio malpermesas en tiu ĉi Ordono?

Dio malpermesas ĉian ŝteladon kaj rabadon, ĉiun eksterleĝan alproprigon de aĵoj helpe de perforto aŭ de ŝajna leĝeco, kiel ankaŭ helpe de malĝusta mezurado kaj falsaj informoj. Same li malpermesas avarecon kaj samtempe malavaran malŝparon de siaj donitaĵoj kaj talentoj.

Biblia fundamento: Pro 29, 24; Prov 28, 24; Gal 5, 26; 1Tim 6, 6-10

90 Sed kion Dio volas de ni per tiu ĉi Ordono?

Ke mi subtenu la profiton de mia proksimulo kie ajn mi povas kaj ke mi traktu lin tiel, kiel mi mem volas esti traktata. Ke mi fidele kaj brave laboru por povi helpi al tiu, kiu mian helpon bezonas.

Biblia fundamento: Efs 4, 28; Fil 2, 4; Mat 7, 12

La 9-a ORDONO
Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.

91 Kion Dio volas per tiu ĉi Ordono?

Ke mi kontraŭ neniu persono eldiru falsan ateston, ke mi niam misturnu la vortojn, ne kalumniu aliulojn aŭ ilin insultu. Ke mi ne helpu iun ajn kondamni, sen ekzameni la aferon en persona interparolo kun la koncernulo ĝis la grundo de la afero.
En ĉiuj aferoj mi estu vereca kaj sincera, savante kaj subtenante la honoron kaj bonan renomon de mia proksimulo.

Biblia fundamento: Pro 19, 9; Efs 4, 25; Mat 5, 37; Mat 15, 11; Jak 1, 26; Jak 3, 5-12
La 10-a ORDONO
Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo.

La 10-a ORDONO
Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.

92 Kion Dio volas per tiu ĉi Ordono?

Ke nia koro malamu ĉiun pekon kaj estu libera de deziregemo, envio, ĵaluzo kaj aliaj malbonaj tendencoj. Kontraŭ tio ni volas nin orientigi laŭ Dio kaj liaj donitaĵoj kaj esti dankemaj pro ili.

Biblia fundamento: Rom 12, 9; 1Joh 2, 15-17; Jak 1, 14.15; Rom 13, 13.14; Mat 6, 33; Psl 37, 4

Pri la preĝo

93 Kion signifas preĝi?

Preĝi signifas paroli kun Dio.
Preĝi signifas, eksilenti kaj lasi Dion paroli al ni pere de Sia vorto kaj Spirito.

Biblia fundamento: 2Sam 7, 18.20; Psl 4, 2-3; Psl 62, 9; Psl 62, 2; Psl 34, 5; Psl 138, 3

94 Pro kio la kristano bezonas la preĝon?

La preĝado estas la spirado de la animo.
Ni bezonas la preĝon, ĉar ni estas helpon bezonantaj homoj kaj komplete dependaj de Dio.
En sia graco Dio de ni postulas, lin adori kaj ĉion de li peti kaj esti dankema al li pro ĉio.

Biblia fundamento: Psl 69, 33; Agoj 2, 42; 2Kro 20, 12; Joh 15, 5; Jer 33, 3; Luk 18, 1

95 Kiamaniere ni rajtas alproksimiĝi al Dio?

En pentopreĝo.
En laŭdo kaj danko.
En adoro.
Per petoj.
En intencpeto

Biblia fundamento: Dan 9, 5-7; Ijob 9, 5-7; Luk 15, 21; Psl 145, 21; Psl 103, 1.2; Kol 1, 12-14; Psl 95, 6; 1Tim 1, 17; Jud 25; Apk 5, 12.13; Fil 4, 6; Mat 7, 7; Jak 5, 14-16; Psl 50, 15; Psl 27, 4; 1Tim 2, 1.2; Kol 4, 3.4; Ef 3, 14-21

96 Ĉu Dio elaŭdos niajn preĝojn?

Jes. Se ni petas en fido kaj laŭ lia volo.
Ne. Dio niajn preĝojn ne elaŭdos, se en niaj koroj troviĝas pekoj, duboj, memvolo aŭ memjusteco.

Biblia fundamento: Jes 59, 1.2; Jak 1, 6.7; Jak 4, 2.3; Luk 18, 11-14

97 Kio do estas grava koncerne la preĝadon?

Ke ni voku nur la ununuran veran Dion, kiu revelaciis sin al ni en Sia vorto, per sincera koro.
Ni devus ekkoni, kiom malgrandaj kaj heldependaj ni estas kaj humiliĝi antaŭ la vizaĝo de lia Majesto.
Ni rajtas kredi, ke nia preĝo spite al nia senvaloro antaŭ Dio pro Kristo estos elaŭdita, kiel Li en sia vorto al ni promesis. Tial ni ankaŭ devas insisti en la preĝado kaj ne laciĝi.

Biblia fundamento: Mat 4, 10; Pro 2, 7; Dan 3, 28; 1Mos 18, 27; Dan 9, 18; Rom 8, 26; Psl 130, 1; Psl 103, 14; Mat 21, 22; Joh 14, 13; Kol 4, 2

La Patro Nia

98 Kiel Jesuo instruis preĝi siajn disĉiplojn?

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu Via nomo.
Venu Via regno.
Fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Ĉar Via estas la regno
kaj la potenco
kaj la gloro eterne.
Amen.

(El Mateo 6, 9-13)

La alparolo

Patro nia en la ĉielo!

99 Kial Kristo ordonis al ni Dion alparoli per *Patro nia*?

Por ke li jam tuj dekomence veku en ni la infanan timon kaj fidon al Dio, kio estu la bazo por nia preĝo.
Dio pere de Jesuo Kristo estas nia Patro.
Li volas tion, por kio ni petas en fido, al ni bonvole doni.

Biblia fundamento: Gal 4, 6; 1Joh 3, 1; Mat 7, 11

100 Kial oni daŭrigas per la vortoj *en la ĉielo*?

Por ke ni ne imagu pri la ĉiela majesto de Dio nenion surteran kaj por ke ni atendu de Lia ĉiopovo ĉion, kion ni nepre bezonas por niaj korpo kaj animo.

Biblia fundamento: Agoj 17, 24.25; Psl 121, 1.2; Luk 1, 37

La unua peto

Sanktigata estu Via nomo.

101 Kien montras al ni la unua peto?

Ke ni prave ekkonu Dion kaj lin en ĉiuj liaj faritaĵoj sanktigu, gloru kaj laŭdu.
Tra ili brilas al ni Lia ĉiopovo, saĝo, boneco, justeco, mizerikordo kaj vero.
Nia tuta vivo – en pensoj, vortoj kaj agoj – honoru Dion kaj lin gloru, por ke lia nomo tra ni estu apoteozita kaj ne blasfemita.

Biblia fundamento: Psl 71, 8; 1Kor 6, 20; 1Kor 10, 31

La dua peto

Venu Via regno.

102 Kien montras al ni la dua peto?

Per ĝi ni petas, ke Dio pere de sia vorto kaj Spirito regu kaj ni plene subiĝu al Li.

Ni ankaŭ petas, ke Dio tenu sian komunumon kaj ĝin multipligu kaj detruu ĉiujn agojn de la diablo kaj ĉiun povon, kiu leviĝas kontraŭ Dio.
Aldone ni petas, ke Dio, la Patro, venigu sian regnon ĝis la pleno, en kiu Li estos Ĉio en ĉio.

Biblia fundamento: Psl 119, 105; Psl 143, 10; Joh 17, 11; Mat 9, 37.38; Joh 3, 8; 1Kor 15, 15, 28; Apk 21, 3

103 Kiamaniere Dio venigos sian regnon al la pleno?

En tri periodoj.
Dum la nuna tempo ĉiuj nacioj de la tero devus aŭdi la evangelion de Jesuo Kristo.
Poste, post la nupto de la Ŝafido Dio starigos sur tiu ĉi tero la miljaran pacoregnon.
Kaj fine de ĉiuj tempoj Li kreos novanĉielon kaj novan teron, kie nur plu ekzistos la majesto.

Biblia fundamento: Mrk 16, 15; Mat 24, 14; Luk 17, 21; Ef 2, 19.20; Apk 20, 2.3; MiĤ 4, 3.4; 2Pet 3, 12.13; Apk 21, 1.5-7

La tria peto

Fariĝu Via volo,
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.

104 Kien montras al ni la tria peto?

Ni devas rezigni pri nia propra volo kaj rekoni la volon de Dio, ĝin akcepti kaj obei sen kontraŭdiri.
Same, kiel la volo de Dio okazas en la ĉielo, tiel Li volas ĝin vidi plenumita ankaŭ ĉe ni.

Biblia fundamento: Rom 12, 1.2; Kol 1, 9.10; Mat 16, 24; Joh 4, 34; 1Pet 4, 11

La kvara peto

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiau.

105 Kien montras al ni la kvara peto?

**Ni petas Dion, ke Li prizorgu nin per ĉio bezonata por la korpo kaj animo, ja Li estas la Fonto kaj la Donanto de ĉio bona.
Ni ankaŭ petas, ke Dio igu nin ekkoni, kiel ni estas en ĉiuj aferoj dependaj de lia beno, por ke ni fidu sole al Li.**

Biblia fundamento: Agoj 14, 17; 2Tes 3, 10.11; Psl 127, 1.2; Psl 37, 16; Joh 6, 12; 1Tim 6, 8; Luk 6, 38; Mat 4, 4; Jak 1, 17

La kvina peto

***Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.***

106 Kien montras la kvina peto?

**Ni devas ĝuste ekkoni, ke ni devas havi de Dio pardonon por nia kompleta kulpo. La pardono de Dio tra Jesuo Kristo estas fundamenta kaj perfekta. Tiun ĉi pardonon devas havi homo, cetere li ne povas esti akceptita de Dio
Jesuo instruas nin, ke Dio nur povas nin pardoni, se ni pardonas niajn kunhomojn.**

Biblia fundamento: Psl 90, 7.8; Psl 130, 3.4; 2Kor 5, 19; Jes 33, 24; Kol 2, 13; Heb 10, 17; Efs 4, 32; Mat 18, 21-35

107 Ĉu infano de Dio devas ĉiam denove peti pardonon?

En la instruo de apostoloj ni ne trovas iun ajn atentigon pri tio, ke ili instruis la kredantojn, ĉiam denove peti por la pardono, se ili iam atingis la pardonon kaj la savon.
Sed ili instruis, penti por la faritaj pekoj kaj kredi je poreterne valida ofero de Kristo kaj danki pro tio.
Tial ĉiuj, kiuj ankoraŭ vivas en la peko, sed volas de tio liberiĝi, devas peti por la pardono.

Biblia fundamento: Efs 1, 7; 1Joh 2, 1.2; Apk 3, 3; Heb 10, 18; Agoj 8, 22

La sesa peto

Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.

Konduku nin tiel, ke ni ne falu pro la tento.
(Laŭ la aramea biblioteksto)

108 Kien montras la sesa peto?

El nia propra povo ni ne povas kontraŭstari niajn decidemajn malamikojn, la diablon, la mondon kaj nian propran karnon, kiuj nin ĉiam denove tentas peki. Dio nin retenu kaj gardu per la povo de Sankta Spirito, ke ni ne perdu lukton en tiu ĉi spirita batalo, sed kontraŭe eltiru la venkon.

Biblia fundamento: Mrk 143, 38; Efs 6, 10.11; Gal 5, 17.18; 1Kor 10, 12.13; Jak 1, 13-15; Joh 5, 4

La fino de la preĝo

Ĉar Via estas la regno
kaj la potenco
kaj la gloro eterne. Amen.

109 Kien montras la fino de tiu ĉi preĝo?

Por ĉio-ĉi ni petas de vi tial, ĉar vi kiel nia Patro, havanta la povon super ĉiuj estaĵoj, volas kaj povas nin regali per ĉiuj bonaj aferoj.
Tiamaniere iru la tuta honoro ne al ni, sed al via sankta nomo.

Biblia fundamento: Joh 14, 13; 1Krn 29, 10-13

110 Kion signifas la vorto *amen*?

La vorto *amen* signifas: jen tio ĉi estas vera kaj certa.
Mia preĝo sekve estas elaŭdita de Dio, sendepende de miaj sentoj.

Biblia fundamento: 2Kor 1, 20; Apk 3, 14; 5Mos 27, 15-26

SANKTAJ SIGNOJ

Pri la sanktaj signoj[1]

111 Kio estas la sanktaj signoj?

**Tio estas de Jesuo Kristo establitaj simbolaj agoj.
Tio estas videblaj, sanktaj signoj, establitaj pro tio, ke ni pere de ĝia uzo pli bone komprenas la promesojn de la evangelio: nome, ke Dio la pardonon de niaj pekoj kaj la eternan vivon donacis al ni el sia graco surbaze de la unufoja ofero fare de Jesuo Kristo, plenumita surkruce.
En ambaŭ sanktaj signoj, tiu de la sankta bapto, kaj tiu de la sankta vespermanĝo, ni atestas antaŭ Dio kaj homoj nian fidon en la evangelion.**

Biblia fundamento: Mat 28, 19.20

112 De kie venas tiu ĉi kredo, kiu *sola* nin partoprenigas je Kristo kaj ĉiuj liaj bonagoj?

La Sankta Spirito estigas en ni tiun ĉi kredon pere de la predikado de la evangelio, kaj tra la uzado de la sanktaj signoj tio ricevas por ni videblan formon.

Biblia fundamento: Rom 10, 13-15.17

[1] En origino estas la vorto „sakramento“, tamen tio ne estas biblia vorto, protestantoj ĝin uzis kiel postrestaĵon de katolika invento, kiu vidas en la sakramentoj propran dian povon, kion la protestantoj ne kredas, tial mi proponas prefere uzi la biblie atestitan vorton „signo“ (rim. de traduk.).

La sankta bapto

113 Kiamaniere Kristo establis la sanktan bapton?

En sia misiordono, kiam li ordonis al siaj disĉiploj:
„Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi.“
(Mat 28, 19.20)

114 Kion efektivigas la bapto?[2]

Kiel la akvo forlavas la eksteran fizikan malpuraĵon, tiel mi estas pere de la sango kaj la Spirito de Kristo purigita de la malpuraĵo de mia animo kaj de ĉiuj pekoj.
Kiel ĉe la subakviĝo la homo malaperas kaj denove venas en aperon, tiel mi kiel la pekulo mortis kun Jesuo Kristo kaj kiel la nova homo kun li releviĝis, kio signifas, ke mi fariĝis unu kun li.

Biblia fundamento: Agoj 2, 38; 1Kor 6, 11; Rom 6, 3.4; Gal 3, 27; 1Kor 12, 13

115 Kio estas grava por la bapto?

La fido.
Ni ne estas savitaj pro la bapta ceremonio, sed pro la fido en la savoagon de Kristo.
Tial ni ne atribuu al la bapto per la akvo falsan signifon. Ni ne rigardu en ĝi la parton de nia sanktiĝo kaj ni ne disputu pri tio. Ĉiu havu certecon pri sia opinio kaj tasko.

Biblia fundamento: Mrk 16, 16; Efs 2, 8.9; 1Kor 14, 17

[2] Fakte la bapto tion ne efektivigas, sed nur simbolas la efektivigon de la unusola sinofero de Jesuo Kristo surkruce. Estas grave diferenci la veran evangelian komprenon pri la bapto disde la falsa, kiu vidas en tiu ĉi sankta signo pli ol ĝi povas esti, nome miraklan povon, kiu mem purigas la homan animon de liaj pekoj kaj pretendas efektivigi la novnaskiĝon de la homo, pro kio multaj homoj estas misorientitaj en falsa fido (rim. de traduk.).

116 Kiu povas esti baptita?

Tiu, kiu volas kaj povas pere de la bapto atesti sian distanciĝon de la peko kaj de la mondo kaj sian fidon je Jesuo Kristo por atingi la novan vivon.

Biblia fundamento: Agoj 8, 36-38; Agoj 18, 8

117 Ĉu etinfanoj (beboj) estu baptitaj aŭ prefere benitaj?

En la Sankta skribo ni nenie vidas ekzemplon, ke etaj infanoj estus baptitaj. Sed ni legas, kiel oni venigis ilin al Jesuo kaj li metis siajn manojn sur ilin benante.
Tial la infanoj estu baldaŭ post la naskiĝo benitaj. Ili havas partoprenon en la ligo de Dio kaj apartenas al lia komunumo kiel iliaj fidantaj gepatroj. Kiel al tiuj, en la sango de Kristo al la infanoj estas promesita la liberigo de iliaj pekoj. La Sankta Spirito, kiu efektivigas la kredon, estas promesita ankaŭ por ili.

Biblia fundamento: Mrk 10, 13-16; 1Kor 7, 14

La sankta vespermanĝo

118 Kiamaniere Kristo establis la sanktan vespermanĝon?

Apostolo Paŭlo diras en sia 1-a epistolo al Korintianoj 11, 23-26: „Ĉar mi ricevis de la Sinjoro tion, kion mi ankaŭ transdonis al vi, ke la Sinjoro Jesuo en la nokto, en kiu li estis perfidita, prenis panon; kaj doninte dankon, li dispecigis ĝin, kaj diris: Ĉi tio estas mia korpo, kiu estas por vi; ĉi tion faru por memorigo pri mi. Tiel same ankaŭ la kalikon post la vespermanĝo, dirante: Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia sango; ĉi tion faru ĉiufoje, kiam vi trinkos, por memorigo pri mi. Ĉar ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis li venos.“

119 Kion efektivigas[3] la sankta vespermanĝo?

Ke Jesuo Kristo sian korpon kaj sian sangon tiel certe oferis por la deaĉeto de mia kulpo, kiel la pano kaj la kaliko estas al mi proponataj.
Kiel la pano kaj la vino, kiujn mi alprenas, estas la nutraĵo por mia korpo, tiel la krucumita korpo kaj la verŝita sango de Kristo estas por mia animo la nutraĵo por la eterna vivo.
Pere de la sinofero de Kristo mi kun ĉiuj novenaskitoj havas komunecon kun nia Sinjoro Jesuo Kristo.
Same kiel multaj pecoj de unu pano estas dispecigitaj, tiel la veraj fidantoj konsistigas la korpon de Kristo.

Biblia fundamento: 1Kor 10, 16.17; 1Kor 12, 27

[3] Ankaŭ la sankta vespermanĝo el si mem nenion efektivigas, kiel ĝi jam dum la origina vespermanĝo de Jesuo kun liaj apostoloj mem nenion efektivigis, krom funkcii kiel metaforo por la sinofero de Jesuo sekvatage, kaj same, kiam ni tion ripetas laŭ lia ordono, kiel memorigilo pri lia vivo kaj sinofero por niaj pekoj. La instruo de kelkaj eklezioj, ke dum tiu rememoriga ago la pano efektive transformiĝas en veran korpon de Jesuo Kristo, ne havas bazon en la evangelio, ja Jesuo mem diris, kiel ni povas legi en la evangelio de Johano, 4, 34: „Mia nutraĵo estas plenumi la volon de Tiu, kiu min sendis kaj fini Lian laboron“ (rim. de trad.).

120 Kion signifas, manĝi la korpon de Kristo kaj trinki lian sangon?

Per fidanta koro alpreni la tutan suferon kaj morton de Kristo.
Pere de agado de la Sankta Spirito havi parton ĉe la apoteozigita Sinjoro Jesuo Kristo kaj lia estaĵo.
Esti preta por la tago de Jesuo Kristo.

Biblia fundamento: Rom 8, 32; Heb 2, 2.3; Heb 4, 3; Efs 1, 22.23; Efs 2, 6; Joh 16, 13.14; Heb 3, 14; 1Kor 111, 26; 1Pet 1, 13

121 Kiu alprenu la sanktan vespermanĝon?

Tiu, kiu rezignis plu peki kaj volas postsekvi Jesuon Kriston kaj fidas lin en penta sinpoziciigo, ke lia tuta kulpo pere de la sango de Jesuo estas deaĉetita.
Gravas la memekzameno, kiu neprakaze kondukas al la pento kaj nur poste al la alpreno de la sankta vespermanĝo.

Biblia fundamento: Mat 11, 28; Joh 6, 37; Heb 10, 22; 1Kor 11, 28

122 Kiu *ne* prenu la sanktan vespermanĝon?

Tiu, kiu en sia vorto kaj faro aperas kiel nekredanta kaj sendia homo, tiu, kiu vivas en malpaco kun Dio kaj ne volas pentofari. Se tia homo tamen prenas la sanktan vespermanĝon, tiu manĝas kaj trinkas sian kondamnon mem.

Biblia fundamento: Psl 50, 16.17; Mrk 11, 25; 1Kor 11, 27.29

La servo de la ŝlosiloj

123 Kio estas la servo de la ŝlosiloj?

Tio estas la predikado de la sankta evangelio kaj la biblia komunuma disciplino. Pere de ambaŭ aferoj por la kredantoj malfermiĝas la Regno de Dio kaj ĝi fermiĝas por la nekredantoj.

Biblia fundamento: Mat 16, 19

124 Kiamaniere la Regno de Dio malfermiĝos kaj fermiĝos pere de la predikado de la sankta evangelio?

**Laŭ la ordono de Kristo estas anoncate kaj publike atestate:
Por ĉiu, kiu faras penton kaj kredas je la evangelio, estas pro la meritoj de Kristo pardonitaj ĉiuj pekoj.
Sed super ĉiu nekredanto kaj bigoto troviĝas la kolero de Dio kaj lin atendas la poreterna malbeno, se li ne konvertas sin.**

Biblia fundamento: 5Mos 30, 15; Agoj 3, 19; Joh 3, 18

125 Kiamaniere la Regno de Dio estos pere de la biblia komunumdisciplino malfermita kaj fermita?

**Laŭ la ordono de Kristo tiuj, kiuj estas nomataj kristanoj, tamen ili disvastigas la nebiblian instruon aŭ vivas sendian vivon, estu fratece admonataj.
Sed se ili ne ĉesas praktiki siajn misaĵojn kaj blasfemaĵojn, do ili estu venigitaj al la estroj aŭ al la komunumo por ricevi admonon.
Se ili eĉ post tio ne faras penton, do ili estas eksigitaj el la Regno de Dio mem.
Se ili tamen konvertiĝas, tiam ili estu denove prenitaj en la komunumon kun frateca amo.
Tamen la singardo estas konsilita laŭ la alegorioj de Jesuo pri la „lignero kaj la balko en la okulo“ kaj pri la „herbaĉo miksite inter la tritiko“.**

Biblia fundamento: Mat 18, 15-18; 2Tes 3, 6; Jak 5, 19.20; Mat 7, 1-5; Mat 13, 24-30

La konkluda vorto

126 Ĉu la infano de Dio povas esti gardata antaŭ la puno?

Jes, „kiuj estas gardataj de la potenco de Dio per fido al savo preta malkaŝiĝi en la lasta tempo“ (1Pet 1, 5).

Biblia fundamento: 1Tes 5, 23.24; Jud 24.25

127 Sed kion faras la filo de Dio, se li denove falis en pekon?

Li ne preteriras facilanime, sed tuj sincere pentofaras, denove leviĝas kaj daŭre fidas en plenvaloran oferon de Jesuo Kristo.

Biblia fundamento: Apk 3, 3; Psl 32, 5; 1Joh 2, 1.2

128 Laŭ kio oni povas rekoni, ĉu iu troviĝas tuj antaŭ la defalo?

Se iu pere de sia senkredo je la amo de Dio komencas dubi aŭ pridemandas la vorton de Dio per mondecaj argumentoj.

Biblia fundamento: Jud 20, 21; Jak 1, 8; Heb 3, 12.13; 1Joh 4, 5; Mat 6, 21; Mat 12, 34

129 Kion ni diru, se kelkaj denove sin turnas for de Jesuo?

„Sinjoro, al kiu ni iru? Vi havas la vortojn de eterna vivo. Kaj ni ekkredis kaj scias, ke vi estas la sanktulo de Dio.“
(Joh 6, 68.69)

Biblia fundamento: Heb 10, 38.39

130 Kion diras la Biblio pri nia konduto rilate misinstruojn?

„Gardu vin, ke neniu prirabu vin per filozofio kaj vanta trompo, laŭ la tradicio de homoj, laŭ la elementoj de la mondo, kaj ne laŭ Kristo.“ (Kol 2, 8)

Biblia fundamento: 2Joh 7-11; Mat 15, 14

131 Kian alvokon ni ricevas por la konkludo?

„Kaj nun, infanetoj, restu en li; por ke, se li elmontriĝos, ni havu kuraĝon, kaj ne hontu antaŭ li ĉe lia alveno.“ (1Joh 2, 28)

Biblia fundamento: Fil 1, 6

KELKAJ AKOMPANAJ VORTOJ AL ESPERANTA LEGANTO

Vinko Ošlak

Esperantisto, se aŭtenta – kaj apenaŭ troviĝas malaŭtentaj – estas je unu triono disĉiplo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, eĉ se li/ŝi estas ateisto. La nomo de nia kara lingvo estas prenita el tri bazaj virtoj kaj kategorioj de la kristana kredo, kian predikis la apostoloj kaj ĝis niaj tagoj predikas la veraj postsekvantoj de Jesuo: la ESPERO. Apostolo Paŭlo diras, resumante: „Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo“ (1Kor 13, 13). Ĉu nur esperon? Ĉu nur tiun ĉi kristanan virton havas la esperantisto, la aŭtenta? Mi supozas, ke vera esperantisto havas ankaŭ amon, foje eĉ surprize grandan amon, laborante obstine por la celo, kiu antaŭ la homaj okuloj ne efektiviĝas, kies fruktoj eĉ ne komencis vere kreski, por ne paroli maturiĝi kaj sukeriĝi por la lacaj laborantoj. Strikte parolante, vera esperantisto posedas du el tri kristanaj kategorioj: la esperon kaj la amon. Mankas nur la tria, kiun la apostolo prenas por la plej granda: la fido.

Ne mankas en esperanta movado kaj historio sociologiaj kaj psikologiaj esploristoj, kiuj provas per siaj sciencoj kaj scioj, personaj spertoj kaj donitaĵoj ekzameni, kial tiel nobla ideo kiel Esperanto ne havas sukceson laŭ la mezuro de ĝia vera signifo. Ili trovas multajn kialojn, el kiuj tre verŝajne ĉiu unuopa efektive havas sian influon kaj efikon. Sed se oni starigus bazan demandon, kian nur la konanto de la Dia vorto povas kaj pretas starigi, oni baldaŭ ricevus tre klaran respondon. Ĝi ne troviĝas rekte kaj per ĝuste tiuj ĉi vortoj en la Biblio, tamen logike rezultas el ĝia Dia Spirito. La afero, kiu baziĝas el la sama kategorio, sur kiu Jesuo Kristo konstruis sian savan „projekton“, principe ne povas kreski alimaniere kaj per pli granda rapideco kaj ekstera sukceso ol la afero de nia Sinjoro mem. Kaj la ekstera sukceso de Jesuo kaj lia instruo estas post 2000 jaroj eĉ pli magra ol la sukceso de tio, kion proponis al la mondo Zamenhof post nur 120 jaroj de sia ekzisto! La tipe kaj plej ofte babiloneca homo simple ne povas alpreni la solvon, kiu laŭ sia baza principo kontraŭas la orgojlajn inĝenierojn kaj masonistojn en Babelo, ke ilia zigurato, kiu simbolis la blindan memfidon de la tiamaj homoj, kiuj volis, kiel oni povas legi en la 11-a ĉapitro de Genezo, la 1-a libro de Moseo: „… ke ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero“ (1Mos 11, 4). La sekvo estas konata: la decido de Dio, konfuzi la homan lingvon. Kaj tiu konfuzo ne ĉesis en tempoj antikvaj, kiel la niatempa naivulo revas, sed daŭras ĝis niaj tagoj. La hodiaŭa homaro havas en si la saman falsan spiriton kiel tiu el la patriarkaj tempoj de Genezo. Kiamaniere do tiu ĉi babeltura homaro povus akcepti ideon, inspiritan ne de Babelo, sed de la pentekosta miraklo en Jerusalemo, kiam la apostoloj ricevis la Sanktan Spiriton kaj kuraĝe

eliris prediki pri Jesuo Kristo sur la stratojn de Jerusalemo, kaj ĉiuj ilin komprenis ĉiu en sia propra lingvo? Neniel! Ho, jes, troviĝis kaj nun troviĝas kelkaj unuopuloj, kiuj sin sentas altirataj pro genia gramatika strukturo de nia lingvo; troviĝas aliaj, kiuj brave kalkulas potencialan komercan profiton, kiu proponiĝus al la homaro, se ĝi alprenus tiun ĉi racian solvon; kaj troviĝas kelkaj poŝtmarkkolektantoj, kiuj utiligas nian lingvon por sia ĉarma hobio. Sed tio ne estas veraj esperantistoj en Zamenhofa senco. Jes, ili estas veraj esperantistoj en la senco de bulonja deklaro kaj difino, ja ili estas uzantoj de la lingvo internacia. Sed en tiu senco estis esperantisto ankaŭ ĉu nazia ĉu stalinisma sekretpolicisto, kiu ricevis komandon ellerni nian lingvon por denunci esperantistojn kaj ilin persekuti ĝis mortigo. Laŭ bulonja difino ankaŭ tiuj estis senriproĉaj esperantistoj. Zamenhof kun tia esperanto kaj esperantismo ne volis havi ion komunan, ĉar li ne elektis hazarde la kategorion de la espero sia pseŭdonimo por subskribi sian unuan esperantan libron kaj tiel senkonscie doni al la lingvo tiun ne nur belsonan, sed ankaŭ tiel profunde signifan nomon.

La mondo, kiu ne volas akcepti sian Savanton Jesuon Kriston, samlogike kaj samspirite, nome fispirite, ne povas akcepti la lingvon, kiu ne naskiĝis sen sia enhavo kaj sia spirita marko, kaj tiu enhavo kaj marko estas kongruaj kun la instruo de Jesuo Kristo. Ne ekzistas pli preciza kaj certa pruvo, ke Esperanto plaĉas al Dio ol ĝia malsukceso kaj malrenomo en tiu ĉi mondo. La vortoj de la apostolo Paŭlo, kiuj finfine estas la vortoj de Dio mem: „Dio elektis la malfortajn objektojn de la mondo, por hontigi la fortajn; kaj la malnoblajn objektojn de la mondo, kaj la malestimatajn Dio elektis, kaj eĉ la malrealajn, por neniigi la realajn; por ke neniu karno fieru antaŭ Dio“ (1Kor 1, 27-29). Ne estas malpermesite en pensoj anstataŭigi „malfortan objekton“ per Esperanto, ja ni ĉiuj suferas pro ĝia malforteco en la familio de homaj lingvoj; „malnoblan objekton“ per Esperanto, ja ĉiu preterpasanto uzas la okazon por informi nin pri la malnobleco kaj malrenomo de la Zamenhofa ideo kaj lingvo, eĉ ne agnoskante al ĝi esti lingvo; „malestimatan“ per Esperanto, ja ĝi ne nur estis kaj daŭre estas ege malestimata, ĝi multfoje estis ankaŭ persekutita; kaj „malrealajn objektojn“ ankoraŭfoje per Esperanto, ja ne troviĝas pli ofta riproĉo al ni ol tiu de nerealeco kaj utopieco, do la samo, nur grekdevene, de nia ideo kaj lingvo! Se tiel, nia lingvo troviĝas en la plej bona analogia parenceco kaj proksimo: kun tiu de la evangelio mem. Ne nur, ke nun, el la Biblio, ni povas bone kompreni, kial la mondo ne povas kaj ne volas alpreni nian lingvon; ni povas el la sama fonto ankaŭ bone kompreni, ke tiom longe, ĝis nia centra kategorio restos la espero kaj ne la profito, la unua kaj poreterna esperantisto estas Jesuo Kristo mem. Ni ne bezonas kompili leksikonojn de renomaj homoj, kiuj eble foje diris iomete amikan vorton pri Esperanto, sed neniam investis eĉ nur du horojn por ĝia lernado kaj aplikado, kiel Tolstoj

tion faris – ni havas unu nuran nomon, kiu plene sufiĉas. Jesuo Kristo mem estis la esperantisto antaŭ ol Esperanto estis elpensita. Se tiel, nia lingvo same ne venkos en tiu ĉi mondo, kiel Jesuo kaj lia Regno ne venkos en tiu ĉi mondo, ĝis li venos la duan fojon en gloro, kiel estas anoncite en la evangelio. Nur tiam, sub la sceptro de nia Sinjoro, en lia miljara Regno, ankaŭ la lingvo de la espero povos fariĝi la lingvo de la tuta homaro.
Sed same kiel tiu, kiu ekkonis kaj en fido alprenis Jesuon, jam nun, jam en tiu ĉi babeleca kaj koruptita mondo en sia koro kaj en sia komunumo de fideluloj jam partoprenas en la Dia Regno, same tiuj, kiuj vere esperas, povas havi sian lingvan komunumon jam nun, sen kondiĉigi tion per la „fina venko“. Kaj plej intense tiu komunumo vivos, se ĝi al sia lingvo atribuos la adekvatan enhavon kaj mesaĝon – kaj kio povas esti por Esperanto pli adekvata ol la Dia vorto mem! La vera venko de Esperanto ne estas, ke la plej grandaj koncernoj ĝin ekuzu por siaj negocoj kaj profitoj – la vera venko de Esperanto estas, se per ĝia uzo iu homo renkontas la Dian vorton kaj ĝin alprenas, konvertiĝas kaj naskiĝas denove kiel nova kreitaĵo en Kristo. Oni ne povas fari pli grandan utilon al Esperanto ol uzi ĝin en la evangelizado de la nacioj kaj unuopaj personoj dise en la mondo. Kaj oni ne povas fari pli grandan utilon al kristana misio ol donaci al ĝi tiel taŭgan instrumenton por prediki evangelion al la tuta kreitaro ol Esperanto estas.

Kiam oni nuntempe legas aŭ aŭdas la vorton „katekismo“, oni pliparte pensas pri la tipa maniero instrui per demandoj kaj respondoj. Tiu bildo eĉ ne estas falsa. Nur, troviĝas du manieroj respondi la demandojn: la plej kutima, aparte ĉe grandaj kaj al la evangelio ne fidelaj konstantenaj eklezioj kaj ankaŭ neekleziaj ideologioj, ke la sama homo, kiu starigas la demandon, ankaŭ ĝin respondas. Pro tio la nomo katekismo perdis sian bonan renomon kaj en multaj oreloj sonas kiel simbolo de dogmismo kaj nesincera pedagogia manipulado de junaj homoj. Mia generacio ankoraŭ bone rememoras la „katekismon“ da la stalena komunisma doktrino, kiu estis aranĝita precize laŭ la modelo de la katolikaj katekismoj. La fifama sovetia libro „La mallonga kurso de la historio de la Komunista partio de bolŝevikoj“, kiu tiom imitis religiojn, ke ĝi eĉ estis presita sur la „biblia“ papero, estis vera malo de la Dia vorto kaj kondiĉigis dogme kaj primitivkrude milojn kaj milojn de la partiaj funkciuloj en la tuta orienta Eŭropo de Vladivostoko ĝis Triesto.

Ne tia estas tiu ĉi kristana katekismo. Jes, ĝi havas la saman strukturon de demandoj kaj respondoj, kio donas klaran trarigardon de la temaro, sed la diferenco estas senkompara: en vera kristana kaj tiel origina katekismo, ja ĉiuj aliaj estas spirita falsifaĵo kaj ŝtelaĵo, la homo demandas – sed Dio per sia vorto, por ni legebla en la Biblio, respondas. Eĉ se la unua respondalineo venas el homa redakto, tamen ankaŭ ĝi plene akordiĝas kun la bibliaj citaĵoj, kiuj sekvas. Ne nur tio: la leganto havas ne nur rajton, sed

eĉ taskon, kontroli, ekzameni la pravecon de la homa respondparto sur la fono de la bibliaj citaĵoj. La lasta aŭtoritato de la respondoj en tiu ĉi libreto restas ĉe Dio mem, Lia vorto staras absolute suverene super la homa vorto. Tian katekismon oni vane serĉus ĉu en romkatolika, nazia aŭ bolŝevisma versioj. Tie respondas kaj absolutisme kaj dogmisme difinas la homo, kiu momente posedas povon kaj rimedojn por disciplinigi la homojn. Ni danku Dion, ke ni havas veran katekismon, en kiu neniu homa persono havas rajton kaj eblecon fuŝimiti Dion kaj manipuli homojn per la aŭtoritato, kia apartenas nur al Dio mem.

Kiel tradukisto mi volas averti la leganton, ke la absolute senriproĉaj frazoj en tiu ĉi libreto estas ekskluzive nur tiuj, kiuj estas elprenitaj el la Biblio. Ĉio cetera, do ĉio homdevena, estas ekzamenenda surfone de la Dia vorto kaj ne posedas propran aŭtoritaton kaj validon. La grafika aranĝo en esperanta versio povus iomete fuŝe impresi, ja la bibliaj tekstoj estas nur indikitaj, sed ne ankaŭ presitaj, tiel la absoluta prioritato de ili grafike ne aperas tiel forte. Tial oni povas ĝuste legi tiun ĉi katekismon nur per la malfermita Biblio ĉemane. Ni esperantistoj havas bone tradukitan Biblion kaj povas tiel bone kompletigi tiun ĉi katekismon per la Vorto, kiu konsistigas ĝian esencan parton.

Tiu ĉi katekismo ne estas propraĵo aŭ specifo de iu certa kristana eklezio, ja esence ekzistas ununura vera eklezio de Kristo, de li fondita kaj de lia Spirito daŭre inspirata kaj kondukata, kvankam ĝi aperas sub diversaj nomoj kaj formoj en la tuta mondo. La unueco de tiu vera eklezio ne troviĝas en la komuna kaj deviga hierarkio aŭ eĉ aparta persono, kiu blasfeme alproprigus al si „anstataŭecon de Kristo sur la tero“, ja ĉiu vera konanto de la Biblio scias, ke Jesuo mem sendis sian veran anstataŭanton, la Sanktan Spiriton. La vera unueco estas en Jesuo Kristo mem kaj rekte, sen homa perado. Ĉiu homo, kiu sincere kredas, ke Jesuo estas Kristo kaj nia Sinjoro, kiu tiel kredas ke la Biblio estas plena Dia vorto, apartenas al tiu vera eklezio de Kristo, senrigarde, kian lokan formon, nomon kaj kutimojn ĝi havas.

Mi finas tiun ĉi tekston per preĝo kaj peto al nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke li benu la laboron de ĉiuj veraj esperantistoj, ja ili estas la pacigantoj, kiujn li en sia 7-a feliĉproklamo promesas nomi „filoj de Dio“ – kaj ke li speciale benu la iron de tiu ĉi esperantlingva kristana katekismo al ĉiuj mondpartoj kaj unuopaj personoj, kiuj serĉas Dion kaj Lian veron.

Amen.